WIKIPEDIA

# Serbokroata lingvo

**Serbokroata lingvo** aŭ **kroatoserba lingvo** (serbokroate: *srpskohrvatski* aŭ *hrvatskosrpski*) estas la plej grava okcidente sudslava lingvo. Ĝi estas la denaska lingvo de la plimulto de kvar el la ses respublikoj de la eksa Jugoslavio (Kroatio, Bosnio kaj Hercegovino, Serbio kaj Montenegro) kaj parolata de 16,3 milionoj da homoj[1]. La serbokroata konsistas el tri normlingvoj, la kroata, la serba kaj la bosna, kaj do estas plurcentra lingvo. Kvankam ofte traktita kiel apartaj lingvoj, lingvistoj konsideras ĝin kiel unu nura kaj sama lingvo, ĉar la diferencoj inter la normaj versioj ne estas pli grandaj ol ekzemple inter la amerika kaj la brita versioj de la angla. Ĉiuj tri normlingvoj baziĝas sur la ŝtokava dialekto. Norme serbokroata estis la oficiala lingvo de la iama Federacia Respubliko Jugoslavio.

ISO 639 havas kodon por la serbokroata, sed en pli novaj versioj de la normo al tiu iama kodo (sh) aldoniĝis la apartaj kodoj por la bosna (bos, bs), la kroata (scr/hrv, hr) kaj la serba (scc/srp, sr).

La skribo de la serbokroata lingvo estas tute fonetika, unu litero donas unu solan sonon, ĉiam kaj ĉie saman. Same ĉiuj nuntempaj variantoj de la lingvo (serba, kroata, bosna kaj montenegra) utiligas fonetikan skribosistemon.

| Serbokroata | |
|---|---|
| **Parolata en** | Kroatio, Serbio, Bosnio kaj Hercegovino kaj Montenegro |
| **Parolantoj** | 24 000 000 |
| **Denaskaj parolantoj** | 16,3 milionoj[1] |
| **Skribo** | latina kaj cirila |
| **Lingvistika klasifiko** | |
| Hindeŭropa | |
| Baltslava | |
| Slava | |
| Sudslava | |
| Okcidente sudslava | |
| **Lingvaj kodoj** | |
| **Lingvaj kodoj** | |
| **ISO 639-1** | sh |
| **ISO 639-2** | scr, scc |
| **ISO 639-3** | hbs |
| **Glottolog** | sout1528 |
| **Angla nomo** | Serbo-Croatian |
| **Franca nomo** | serbo-croate |

Dialekta mapo

## Literaturo


- Okuka, Miloš. *Eine Sprache – viele Erben: Sprachpolitik als Nationalisierungsinstrument in Ex-Jugoslawien.* Klaŭdiforumo 1998. ISBN 3-85129-249-9


## Referencoj


1. ↑ 1,0 1,1 Ethnologue (http://www.ethnologue.com/show_language.asp?code=hbs)


## Eksteraj ligiloj

- http://www.omniglot.com/writing/serbo-croat.htm
- http://www.shaav.com/professional/linguistics/serbocroation.html

**Slava lingvaro**

| | | |
|---|---|---|
| **Okcidentslavaj** | ĉeĥo-slovakaj (ĉeĥa lingvo • slovaka lingvo • knaana lingvo) • soraba lingvo (suprasoraba lingvo • malsuprasoraba lingvo) • leĥaj lingvoj (pola lingvo • pomoria lingvo (kaŝuba lingvo • slovinca lingvo) • polaba lingvo) | |
| **Sudslavaj** | okcidentaj sudslavaj lingvoj (kroata lingvo • bosna lingvo • montenegra lingvo • slovena lingvo • serba lingvo • serbokroata lingvo) • orientaj sudslavaj lingvoj (makedona lingvo • bulgara lingvo • malnovslava lingvo) ... | |
| **Orientslavaj** | belorusa lingvo • ukraina lingvo • rutena lingvo† • rusina lingvo • rusa lingvo • Malnova Novgoroda dialekto† | |

Elŝutita el "https://eo.wikipedia.org/w/index.php?title=Serbokroata_lingvo&oldid=6259902"

**Ĉi tiu paĝo estis lastafoje redaktita je 12:44, 20 jan. 2018.**

La teksto disponeblas laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite-Samkondiĉe 3.0 Neadaptita; eble aldonaj kondiĉoj aplikeblas. Vidu la uzkondiĉojn por detaloj.